# Aŭstraliaj Esperantistoj

## Novaĵletero de ĉiuj Aŭstraliaj Esperantistoj

**RETADRESE AL ĈIU ESPERANTISTO EN AŬSTRALIO, NOVZELANDO KAJ PETANTOJ**



**Redaktoro Roger Springer Provlegita de Franciska Toubale**

**PLENUMITA 08/04/2021 Kvincentdudekkvina eldono (unua eldono 20/09/2011)**



## Subtenu vian Novaĵleteron


Sendu novaĵojn, leterojn, fotojn, informojn al Roger Springer rogerspringer@tpg.com.au;

***Uzindaj ligoj*** *reta-vortaro* *Freelang Vortaro* *Plena Ilustrita Vortaro* *Duolingo* *Googojle Translate* *Pasintaj AE eldonoj* *duolingo entute* *lingvohelpilo* *Esperanta Retradio* *Esperanta himno* *PMEGramatiko* *openclipart.*

Oni povas aldoni sian nomon, retadreson, urbon kaj landon al la listo de ricevantoj. rspring@tpg.com.au

******************************************

## Entute **826,000** lernantoj nun studas Esperanton per Duolingo




Nun studas **291,000** lernantoj per la angla lingvo. (Ekde Majo 2015)
Nun studas **241,000** lernantoj per la hispana lingvo. (Ekde Oktobro 2016)
Nun studas **218,000** lernantoj per la portugala lingvo. (Ekde Majo 2018)
Nun studas **76,000** lernantoj per la franca lingvo. (Ekde julio 2020 )
Nun preparas Esperantan programon por ĉinoj. (Ekde junio 2021)

******************************************

*(Marcel naskiĝis 4-an de Decembro1917*

## EKSTRAĴOJ ĈE LECIONOJ EN LA "THE ESPERANTO-TEACHER" (de Mason Stuttard).






**N.ro 29 de "Por Komencantoj". GRAMATIKAJ KVIZETOJ:**

Respondu al la jenaj gramatikaj demandoj:

1). Tri el la kvar partoj de propozicio (= frazo) estas la subjekto, la objekto, kaj la adjektoj.

Kiu estas la nomo de la kvara parto de propozicio?

2). En tiu kvara parto de propozicio, kia vortspeco estas deviga, kaj kiuj ne?

3). Kiu parto de propozicio ricevas la akuzativan finaĵon "-n", kaj kiu parto povas ricevi la "-n"?

Vi trovos la solvojn de la kvizetoj ĉe la fino de ĉi tiu gazeto A.E. n.ro 525. *Marcel Leereveld.*

******************************************



**La Esperanta Retradio donas bonan ĉirkaŭ-5-minutan aŭskultadon/legadon ĉiun tagon.** Parolmelodio helpas ekkoni vortojn | Esperanta Retradio



******************************************

***Se informo pri via novaĵo mankas, la kialo estas ke neniu informis AE***

# Surhavu vizaĝmaskon.



**Unu terno povas elŝpruci virusojn ĝis 8 metroj.**

https://twitter.com/i/status/1245591199034929153

**Homoj protektas aliulojn per la surporto de vizaĝmaskoj.**



# La Manlia Esperanto-Klubo



La Manlia grupo, kunvenas de 10.30 atm ĝis 12tm la unuan kaj trian sabatojn de la monato. Ni renkontiĝas ĉe la oceana fronto kontraŭ la Restoracio Bluewater Cafe 28-29 Suda Stejno. Unu taso da klubpagita kafo atendos vin. La ĉeestantoj tie diskutas la plej sekuran lokon por la kunveno laŭ la vetero kaj homamasoj. La 3a de aprilo estis la unua sabato. Venis tri, Roger, John kaj Ian. Suna, bela kaj ĝoja tago. *Roger Springer*

**Pasintaj „Aŭstraliaj Esperantistoj" korektitaj atingeblas je la suba adreso**

Ctrl+klaku la veran ligilon) http://aea.esperanto.org.au/australiaj-esperantistoj/?lang=eo

Ĉirkaŭ unu semajno post la ĝenerala elsendo, la korektitaj kopioj estas sendataj al AEA.

# Humurbildojn




Multe da humurbildoj (kun komentoj) mi prenas el E-retpaĝoj! Mi nur por iuj BILDOJ (eble triono?) aldonas mian komenton (rimarkon, ŝercon)...Mi estas nur KUNaŭtoro de iuj bildoj! Sube estas ligilo al mia magazino de jam prezentitaj humurbildoj... Iru tien kaj prenu! https://tiny.pl/rn9gc











https://tiny.pl/rn9gc_ Kun elkoraj salutoj ***Marian** ZDANKOWSKI*

**La tialo pro kiu mankas informo pri via klubo estas ke via klubo ne sendis ĝin al AE**

***Se informo pri via novaĵo mankas, la kialo estas ke neniu informis AE***





## La Ludosistemo

Kiam iu ajn volas fari ion ajn, kaj neniu aktive kontraŭas ĝin, kaj la LM ne opinias ke sukceso estus aŭtomata, la ludanto rulas ĵetkubojn. Se la sumo rulita venkas (egalas aŭ superas) la Testonivelon priskribitan laŭ la LM, sukceso! Se ne, malsukceso! Testoniveloj akordas kun tiu gamo:

5: Facilaĵo. Defio por aĉulo. Rutina por profesiulo.
10: Defio por profesiulo.
15: Heroa defio. Por tre inventaj aŭ artifikaj akrobataĵoj.
20: Defio por Majstro. Preskaŭ superhoma malfacileco.
30: Vi DEVAS esti ŝerca. Efektiva superhoma malfacileco.

La Testonivelo dependas de la Kliŝo, kaj iu ajn povas provi ion ajn.
Transiri fendegon per svingado sur ŝnuro aŭ lieno estus infanludo (aŭtomata sukceso!) por Mantelo kaj Ponardo Batalisto aŭ Mastro de la Ĝangalo, facila (Nivelo 5) por arkeologo de Aventuro-romanoj, kaj defia sed vere farebla (Nivelo 10) for Gimnastikisto, Barbaro, aŭ Rompŝtelisto. Eĉ stranga okulisto en Rulseĝo povas provi ĝin (Nivelo 15, sed la rulseĝo estas perdita krom se la rulo venkas 30)!



Dankon Ŝohano *(Shayne Power)*

## Universala baza enspezo (UBI)




**Por pli kontentiga kaj sekura mondo.**

## De kie venos la mono?



**El la sama loko kie venas bilionoj da dolaroj por la produkto de misiloj kaj la ebla milito kiu sekvas. Ĉiuj militoj helpas la detruon de la planedo**

**Mi ne povas kompreni kial Aŭstralio, kiu fieras pri siaj pafilaj limigitaj leĝoj kaj la rezultantaj malmultaj pafmortantoj, nun bezonas amasmortigajn armilojn.**



**Se vi batalus estu saĝa kaj elektu malfortegan kontraŭulon.**
**Plej saĝa estas ne batali** kaj ĝui la vivon *Roger Springer*

Nur la venkantoj skribas pri la glora historio de milito.



*Roger Springer*

***Se informo pri via novaĵo mankas, la kialo estas ke neniu informis AE***

# El PERTO

## LA MANDORLA ARTO-PREMIO

Ĉi tiu estas la plej signifoplena konkurso de kristanotema arto en Aŭstralio, kun $25,000-a ĉefa premio.

La temo ĉi-jare estas "Micah 6:8", eltiraĵo el la Biblio kiu memorigas nin humile piediri tra la vivo.



La venkinta artaĵo estas tridimensia, travidebla objekto el rezino, en formo kaj grandeco de homo, nekonebla, kaŭranta sur la planko, drapita en truoplena teksaĵo. Ĝi estas lumigita de interne, la lumo brilanta tra la truoj. La figuro reprezentas la milojn da anonimaj, senhejmaj homoj.

Al mi, ĝi similas la Virgulinon Maria. La efiko estas ege potenca kaj mi kredas, ke la venontan fojon kiam mi preterpasos senhejman homon, mi konscios pri la sennombraj tiuj kiuj ekzistas en similaj cirkonstancoj.

Unu bildo valoras milvortojn.



*TrishO'Connor*.

## KIEL MOJOSA ESTAS TIO?

Malofte mi pensas pozitive pri Saŭdi Arabio, tamen se veras kion mi legis pri tiu, la dua plej granda petrolo-produktejo en la mondo (Usono estas la unua), mi klinas la kapon.

La instancoj anoncis lastan semajnon, ke estos plantitaj 10 miliardoj da arboj trans la regno, cele al kontraŭbatali klimatoŝanĝon. La projekto komenciĝos tuj. La lando perdas 120,000 hektarojn da arboj ĉiujare pro segado kaj detruado, do ja tempo por ŝanĝo.



Saŭdi Arabio estas treege seka lando kaj jam ankaŭ la plej granda monda produktejo de sensaligita akvo. Oni uzos tiun kaj ankaŭ recicligitan akvon por la arboj.

Espereble la deklaro ne estas nur vantaj vortoj; ni atendu miraklan novan verdujon, ekzemplo por aliaj landoj sekvi.



Vera Payne.

**_Se informo pri via novaĵo mankas, la kialo estas ke neniu informis AE_**

(Marcel naskiĝis 4-an de Decembro1917)



# Danĝeroj al nia tero.

## NE NUR UNU ,

Ni aŭdas multe, kaj diras multe, pri la danĝero kaŭzata de la veterŝanĝiĝoj kaŭzataj de nia trouzo de venenaj gasoj. Kaj oni ne sufiĉe faras por eviti tion, kun kruelaj danĝeroj por la homaro.

Kaj ni ankaŭ aŭdas kaj parolas pri tio ke ni ne havos sufiĉe da spirebla aero se oni forhakas tro da arboj, kiel en Brazilo, post mortigi grandajn arbarojn en ekzemple Saharo.

Ni ankaŭ aŭdas kaj parolas pri la granda danĝero por pluvivi, se okazos tria mondmilito.

Kaj ni ankaŭ aŭdas kaj parolas pri la danĝero, ke ĉar ni manĝas viandon ne estos sufiĉe da kultivebla tero por havi sufiĉe da manĝaĵo.

**Sed ni malmulte parolas kaj aŭdas pri la fakto** ke, ĉar ni grandskale produktas kaj forĵetas varojn, ni ne plu havos sufiĉe da krudmaterialoj por vivi civilize. En niaj pli riĉaj landoj, kiaj Usono, Njuzelando, Britujo, Eŭropo, kaj speciale Aŭstralio, la merkato de preskaŭ ĉiuj varoj jam estas plena, sed la industrioj kaj la vendejoj bezonas plu vendi por pluvivi. Tio ja okazas en la kapitalisma ekonomio. Kion fari? La nura solvo estas, konvinki la aĉetantojn forĵeti sian havaĵon kaj aĉeti novan. La forĵetitaj artikloj plej ofte estas plu same bonaj kaj utilaj kiom la nove aĉetotaj, sed la vendistoj trovas diversajn manierojn por ŝajnigi ke ili nun estas ne sufiĉe utilaj aŭ belaj. Multaj homoj falas por tiaj ruzoj. Ili do forĵetas multajn bonajn kaj belajn artiklojn por aĉeti la novajn. Se oni inspektas la komunumajn rubujegojn, oni trovas multege da aferoj uzeblaj kaj belaj, kaj mankantaj en malpli riĉaj landoj. Tiel la produktistoj plu funkcias, sed la krudmaterialoj, la plantoj kaj la mineraloj kaj la oleoj malaperas kaj ne sufiĉos por la venontaj generacioj.

La samo okazas pri la nutraĵoj. Multaj familioj preparas tro multe da manĝaĵoj kaj forĵetas kvaronon aŭ duonon en la rubujon. Homoj en malriĉaj landoj povus pluvivi per tiuj forĵetitaj manĝaĵoj. Kaj la kultivebla tereno malpliiĝas. Mi laboris en privataj lernejoj, kies lernistoj havas pli da poŝmono ol aliaj, kaj konstatis ke multaj el tiuj lernistoj dum lunĉhoro ĵetas en la rubujon bonajn lunĉojn preparitajn de iliaj patrinoj kaj aĉetas malbonajn lunĉojn en la butikoj. Dum miloj da infanoj en Afriko malsatas aŭ mortas. Ĉu tio ne estas krimo, forigenda per edukado? *Marcel Leereveld.*

## MODESTU, ESPERANTOLOGOJ !

Nur tre kleraj Esperantologoj faru novajn vortojn en Esperanto. Nur tiuj, en kies sango ĉeestas la spirito de Esperanto. Nur tiuj, kiuj sentas kaj scias la gramatikajn regulojn. Kiuj scias kaj sentas la regulojn pri vortkunmetado. Nur tiuj kiuj scias ke vortkunmetaĵo estas kvazaŭ nova radiko kiu ne permesas sencajn literojn en sia mezo, kiuj scias kaj sentas ke prepozicio agas simile kiel verbo. Se la spirito de Esperanto ne loĝas en ilia sango, la nesufiĉe kleraj faras erarojn kiaj la sensencaĵoj "hejmenveni" por "veni hejmen" kaj "posteulo" por "postvenulo" kaj "tiu butiko peras mian libron" por "mia libro peras tiun butikon". Tiaj Esperantologoj lasu la vortfaradon al la pli kleraj. *Marcel Leereveld*

*Se informo pri via novaĵo mankas, la kialo estas ke neniu informis AE*

*(Marcel naskiĝis 4-an de Decembro1917)* **SOLVO DE LA KVIZETO**



1). La predikato.
2). Deviga estas verbo, kaj nedevigaj estas infinitivo kaj predikativo.
3). La finaĵo "-n" estas deviga por la objekto kaj nedeviga en la adjektoj.

*Marcel Leereveld.*






Ĉinaj kotono-falĉomaŝinoj en Xinjiang 2020.

**3ZZZ** La elsendo de la 5a de aprilo 2021 informas pri la klopodoj rilate la Universalan Kongreson en Belfasto, la rolo de Esperanto en la celebrado de la poeto Dante mortinta antaŭ 700 jaroj kaj la pozitiva efiko de meditado. *Franciska Toubale*



La sufikso "-i-" por landoj estas oficiala sed gramatike malĝusta,
do estas pli bone uzi la Zamenhof'an sufikson "-uj-".

***Se informo pri via novaĵo mankas, la kialo estas ke neniu informis AE***

## Ludkunveno per zoom

Kiel en ĉiu unua dimanĉo de la monato pasintan dimanĉon okazis ludkunveno ekde la kvara posttagmeze. Ni ludis du ludojn. La celo de la unua ludo estas trovi kiel eble plej da vortoj uzante la literojn de kubo respektante ilian ordon sur la kubo. En la dua ludo du teamoj konkursas por trovi la spionojn laŭ la indikoj de la gvidanto, kiu rajtas diri nur unu vorton por priskribi la bildojn, kiuj kovras tiujn spionojn. Malgraŭ la distanco finfine eblas trovi manierojn por komuniki kaj krei la viglan etoson de ludoj. Ĉu pro Pasko nur kvar personoj partoprenis la ludojn. Antaŭ ol disiĝi ni ankaŭ iom babilis.
Espereble venontmonate aldoniĝos pli da ludemuloj. Simple kontaktu Joanne Johns por ricevi la ligilon al la zoom ĉambro. Laŭ franca proverbo: pli da frenezuloj estas, pli da ridado okazas.



Raportis *Franciska Toubale*

# Karaj kontribuantoj. Sen vi, AE ne povas ekzisti

*Mardvespere mi sendas la novaĵleteron al la provlegantino por kontroli la lingvon kaj elsendas al la legantoj dum ĵaŭdo. Uzu ĝin por la reklamo de viaj semajnfinaj eventoj. Poste informu pri la sukcesoj de viaj kunvenoj en la sekvanta "Aŭstraliaj Esperantistoj" por montri ke viaj kluboj ekzistas kaj aktivas*



***Se informo pri via novaĵo mankas, la kialo estas ke neniu informis AE***